

kontakto

*tutmonda
esperantista
junulara
organizo*

n-ro 2
printempo 1964

kontakto

Organo de Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo
(Junulara Sekcio de UEA)

n-ro 2
printempo 1964

Prezo: individua numero - 2,20 ned. gld.
(9 steloj)

Jarabono (minimume kvar numeroj) -
8 ned. gld. (32 steloj)

Redaktoro: Humphrey Tonkin,
7 Linnaean Street, Cambridge 38,
Mass., Usono

Teknika redaktoro: Adriaan den Haan

Reklama Redaktoro: James May

Desegnisto: Jan Schaap

Administrantino: Elly Wijnands

Administrejo, al kiu oni sendu ĉiujn
abonkotizojn, reklamojn ktp.:
"Kontakto", Universala Esperanto-
Asocio, Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando

Bankisto de UEA: R. Mees & Zoonen,
Blaak 10, Rotterdam-1

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v.,
Nieuwe Binnenweg 460, 462,
Rotterdam-6, tel. (010) 5 66 45

Reklamtarifo: La redakcio liveros kon-
traŭ peto. Ekzistas speciala malalta
tarifo por esperantistaj entreprenoj.

Manuskriptojn por "Kontakto" oni
sendu al la redaktoro en du ekzem-
pleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en
korekta Esperanto, kaj ĉiuj supersignoj
devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese
enskribitaj permane. Oni skribu sur
unu flanko de la papero kun interlinia
spaco kaj kun granda maldekstra mar-
ĝeno. Sendu materialon aerpoŝte. Ĉe
leteroj destinitaj al aperigo oni sekvu
la samajn instrukciojn.

La redaktoro aparte bonvenigas arti-
kolojn originalajn aŭ tradukitajn pri
temoj sociologiaj, kulturaj, sportaj kaj
vojaĝaj. Li ankaŭ daŭre bezonas fotojn,
kun aŭ sen artikoloj. Ĉiu materialo
havu iun apartan intereson por la ju-

nularo kaj artikoloj prefere estu ver-
kitaj de gejunuloj mem.

La Redakcio ne respondecas pri opi-
nioj esprimitaj en subskribitaj arti-
koloj — pri kiuj respondecas nur la
verkintoj mem. Respondecon ĝi akcep-
tas nur ĉe artikoloj sen subskribo.

La **fondaĵo junulara gazeto** estas
oficiala fondaĵo de UEA kaj ĝia celo
estas subteni la gazeton de TEJO dum
ĉi tiu frua periodo de ĝia eldonado.
Kontribuaĵojn oni faru rekte al UEA
aŭ ties perantoj, al landaj sekcioj aŭ
al estraranoj de TEJO.

ENHAVO

- 5.000.000 da francaj
gejunuloj akuzas 1
- Drago Kralj: Katastrofoj
de la tuta mondo 5
- Ken Miner: Alta Kanto 7
- Cicely Tyson 9
- Donald Broadribb: Saltas
ne nur la kanguruoj . . 13
- Melvin J. Lasky:
Pri la arto kaj scienco
de neŭtraleco 14



- ...Sed, ĉu viaj gepatroj ne zorgas scii kien vi iras, kaj kun kiu?
- Ili nur volus scii je kioma horo ni revenos.
- Vi mensogas al ili...
- Ni ne mensogas al ili. Ni ne interparolas.
- Finfine, kion vi riproĉas al ili?
- Ili vere montras malafablon ĉe la tablo...

5.000.000 da francaj

gejunuloj akuzas:

”Ĉiuj kontraŭas nin.”

Ni estas, je la oka, sabaton vespere, en iu trinkejo de la avenuo Champs Elysées. La protagonistoj: ses knaboj dekkvin- ĝis deksepjaraj kaj unu gazetisto. La knaboj parolas diligente kaj kun videbla zorgo klarigi, sin pravigi. Nur iomete da provoko en ilia voĉo. Ĉu nesociaj? Ĉu malmolkoruloj? Sim- ple gimnazianoj, eĉ de la burĝaj kvar-

taloj. Post momento, ili eniros aŭton ”404 Peugeot” po dek aŭ dekdu ĉar ankaŭ estos la ”kunulinoj”, kaj ili forrapidos al la semajna surprizvizio.

En la kvartalo oni nomas lin Narnard. Li loĝas kun siaj gepatroj en ruĝbrika konstruaĵo de la laborista kvartalo. Li kore malamas la ”veturi-

lulojn”, la gejunulojn, kiuj dancas la tviston kaj trinkas viskion. Tamen, li diras la samon-kiel ”tiuj trompantoj”. Nur ŝanĝiĝas la vortaro:

”Ne, mi ne ilin malamas, la pliaĝulojn, sed ili nenion komprenas. Do, ni ne multe interparolas...”

”Pli fortranĉite ol iam ajn de la antaŭa generacio,” skribas S-ro André

Le Gall, revizoro de publika instruado, "la nuntempaj gejunuloj timigas. Ĉar ili ŝajnas ne nur transpasi iun fazon kiel ĉiam; ili aspektas fiksitaj en iu stato."

Ne estas speciale la "nigrabluzuloj", kiuj timigas. La organizitaj bandoj kiuj interbatalas pere de biciklaj ĉenoj estas malmultaj: tridekkelko en Parizo, en 1962. Certe ili paroligas pri si... Lastan jaron, la "J.S." (Junaj Stratulaĉoj) sukcesis ŝteli polican aŭtobuson, kaj, freŝdate, en la flughaveno Mantes, aviadilon eĉ! La gazetoj estas plenplenaj je similaj heroaĵoj. Tiu publika atento ĉirkaŭ la "nigrabluzuloj" malpermesas vidi ke ili estas nur kelkaj: dum 1960, en tuta Francujo, 26.894 junaj deliktuloj, el kiuj 2.409 knabinoj, estis juĝitaj. En la sama jaro, oni kalkulis kvin milionojn da gejunuloj dektri- ĝis dudekjaraĝajn.

La juneca delikteco estas nur signo de la junulara krizo. Aliaj pli maltrankviligas: lastan jaron, cent infanoj malpli ol dudekjaraĝaj klopodis sin mortigi. Kuracisto atentigas ke pli ol 50 procentoj de la studentoj forlasas siajn studojn antaŭ iliaj finiĝoj, kaj alia kuracisto, ke, en preskaŭ simila proporcio la teknikaj lernantoj ankaŭ rezignas.

Sed, plej malkvietiga estas tiu fermita mondo en kiu sin malliberigas la junularo, kun siaj propraj manieroj ("blue-jeans" ktp.) kaj siaj herooj (Johnny Halliday). Tiu malamo de la mondo de la plenkreskuloj estas egale rimarkebla ĉe la gimnaziano, la studento kaj la metilernanto. Tiu ribelo.

"Mi rifuzas ĉiun eniron en la socion," diras juna intelektulo. Sen filozofia fargono, same diras Nahard: "En la uzino, oni traktas nin, kiel malpli ol nenio. Mi ne tie volas labori. Mi volas nenion."

"Nesociemo" diagnozas la psikologoj. Ili konstatas ke la malsano ne estas nur franca. En Sidney, en Nov-Jorko aŭ en Varsovio, kiel en Parizo, la gejunuloj havas la saman sintenon de malkonsento. Ĉie, ili similas unu la aliajn. La klasikaj klarigoj ne eksplikas tiun fakton.

"La fruktarbo ne donas fruktojn. Oni asertas ĝin malfekunda," diras Berthold Brecht. "Kiu esploris la grundon?" La grundo estas nia socio.

Rapida maturiĝo

Nova fakto renversis la kondiĉon de la gejunuloj kaj baldaŭ elvokos ŝanĝon en ilia pozicio en la socio: adoleskeco estas nun pli longa ol ĝi iam estis. Estas fakto samtempe biologia kaj socia. En ĉiuj evoluintaj landoj, pli sana nutrado kaj plibonigo de la higienaj kondiĉoj aperigis pli fruan pubharecon: la meza aĝo de ĝia aperado ĉe la junaj norveginoj malaltiĝis de 17 jaroj en 1840 ĝis 13 kaj duono, en Germanujo de 16 kaj duono ĝis 14 kaj duono, en Usono (kiel en Francujo) de 14 en 1890 ĝis 13. La saman fenomenon oni trovas ĉe la knaboj. Adoleskeco komenciĝas pli frue kaj, samtempe, finiĝas pli malfrue. Tre ofte ĝi daŭras ĝis pli ol dudek jaroj. Tio estas konsekvenco de la daŭro de la studoj kaj de la novaj postuloj de la profesia edukigo.

Post du jaroj, plej malfrue, la deviga lernolimo en Francujo estos 16 jaroj. Laŭ multaj instruistoj, tio ne sufiĉas. La slogano "longedaŭraj studoj egalas altajn karierojn" estas pli vera ol iam antaŭe. La simpla bakalaŭreco ne plu permesas akiri veran profesion; ĝi estas nur la ŝlosilo kiu malfermas la pordojn de la universitato. En ĉiuj fakoj, oni ne postulas plu specialistojn, kiel antaŭ kelkaj jaroj; oni postulas firman ĝeneralan kulturon, fundamentan formadon.

Neniam estis pli malfacila, kaj pli longtempa la procedo simple fariĝi plenkreskulo. Tuj post la infanaĝo, la adoleskanto, kiu malkovras la amon kaj ekvidas timigajn transformiĝojn en si mem, ĉiam malfacile adaptiĝas al la mondo de la plenkreskuloj. Tiuj malfacilaĵoj kreskas terure en nia epoko. En la primitivaj societoj la inicialaj ritoj indikas veran limon inter infanaĝo kaj matureco. Je la dekkvina aŭ dekseka jaro la gejunuloj estis submetitaj al certa nombro da provoj, post kiuj ili rajtis eniri la komunumon. Kontraŭe, en niaj societoj, la transira fazo, dum kiu oni ne plu estas infano, kaj oni havas la devojn sed ne la rajtojn de la plenkreskuloj, povas daŭri preskaŭ dek jarojn.

Je dekok jaroj, en Francujo, la gejunuloj ne plu dependas de la infantribunaloj kaj respondecas pri siaj agoj antaŭ la kortumo pri komuna juro. Ĉu oni donas al ili plenaĝecon? Tute ne. Ili devas atendi ĝis la 21-a jaro. Ĝis tiam, ili ne rajtos baloti, ili devos

peti de siaj gepatroj la permeson edziĝi aŭ edziniĝi, kaj eĉ por havi bankkonton. Dum tri jaroj, ili eltenos ĉiujn civitanecajn ĝenajojn sen iuj civitanecaj avantaĝoj.

La principo "por sama laboro, saman salajron" ne estas valida ĉe la gejunuloj. De 14 ĝis 15 jaroj, ili rajtas nur la duonon de la salajro por plenkreskuloj; poste, ĝis ili estas 18-jaraj, ili ricevas nur 60 procentojn. Ek de la 18-a jaro, teorie, ili ne plu suferas diferencon. Sed tiam la veraj malfacilaĵoj komenciĝas. La militservo, tiu intervalo de 15 aŭ 18 monatoj, alproksimiĝas. La estroj tiel argumentas: formi bonan laboriston postulas tempon kaj monon. Kial klopodi por knaboj kiuj forlasos nin precize kiam ili povus komenci fariĝi "mondonantoj"?

Fremduloj

En la laborejo, en la uzino, multaj gejunuloj sin sentas viktimoj de maljusteco. Oni ne traktas ilin kiel la aliajn, ili ne vere estas akceptitaj en la plenkreskulaj rondoj.

"La laboraĉon oni donas al ni. La laboristoj ne estas afablaj. Se ni havas malfacilaĵon, ili lasas nin kuirigi..." Ofte, en la grandaj entreprenoj, oni vidas metilernantojn perdi ĉiun vivĝojon, ĉiun batalemon. La risorto estas rompita: okazas la "psika kolapso". — "Duono de la korespondado de la kuracistoj en la uzinoj, komisiitaj pri la gejunuloj," notas kuracisto, "estas kun la psikiatroj."

En la lernejo kie, tamen, ili estas inter si, ili sin sentas tiel fremdaj kiel en la mondo de la laboro. Frue maturiĝinte, ili ribelas kontraŭ la mallibereco de la "kazerno-lernejo". Kelkaj edukistoj bone scias ke ek de 14 aŭ 15 jaroj, oni ne plu povas ilin konsideri kiel bubojn. Sed kiel agi alimaniere? La klasoj entenas 30 aŭ 40 lernantojn, la programoj estas la plej ŝarĝitaj en la mondo: 39 semajnaj laborhoroj en la unua klasika klaso de gimnazio — tiom kiom plenkreskulo... En tiaj kondiĉoj, eĉ kiam la instruistoj konas la modernajn pedagogiajn teknikojn, ili ne povas ilin praktiki. Ilia rolo estas nur administra. "Konsekvence, pli ol 60 procentoj de la infanoj suferas (laŭ psikiatro), laboras en enuo, kvazaŭ submetite al socia fataleco."

La Nacia Studenta Asocio sciigis nin,

5.000.000

ke en Francujo el 100.000 studentoj, 30.000 estas trafitaj de psikaj malhelpaĵoj. El ĉiuj gejunuloj, la studentoj havas la plej longan adoleskecon. Ĝi daŭras ĝis minimume 22 jaroj. En siaj studentaj domoj kaj restoracioj ili vivas izole. Pli daŭre ol la aliaj, ili konas la duon-dependecon kaj ili devas kalkuli je la familia ĉeko aŭ poŝmono. Tial, kun samaĝo, kaj malgraŭ tre supera intelekta formiĝo, ĝenerale, ili estas malpli maturaj ol la junuloj kiuj gajnas sian vivon ekstere. Tiuj kiuj volas esti sendependaj devas akcepti taskojn ofte neakordigeblajn kun la sekvado de la studoj: telerlavistoj, noktogardistoj, infangardistoj. Por la gejunuloj, mono estas simbolo de sendependeco. Malmultaj gepatroj tion komprenas. Enketo montris, freŝdate, ke, je 19 jaroj, la parizaj studentoj disponas meznombro 12 frankojn (34 stelojn) ĉiusemajne. Paradokse, malpli ol la metilernantoj. En multaj familioj oni konsideras: ni nutris kaj vivtenis niajn infanojn ĝis kiam ili povis labori. Tuj kiam ili povas, ili devas redoni al ni la samon. Estas ŝuldo. Nu, multe da adoleskantoj preta doni sian tutan salajron al la fa-

milio, sed opinias netolerebla ke oni ĝin atendu de ili, kiel naturan aferon.

Por multaj gepatroj, la infanoj neniam kreskas: "Vi ĉiam estas mia knabeto". Nenio pli furiozigas la adoleskantojn ol esti tiel traktataj. La sola senkul-pigo de la gepatroj estas la nun pli frua seksmaturiĝo. Ili ne komprenas ke je 13 aŭ 14 jaroj, oni povas esti preskaŭ plenkreskulo. Socia helpantino citas la kazon de dekkvarjara knabino, kiu freŝdate fuĝis el sia hejmo. Ŝi sencele vagis en la parizaj stratoj, dum horoj; poste, ŝi rifuĝis ĉe onklino en provinca urbo. "Mi ne komprenas," diris ŝia patrino, "nenio mankas al ŝi: jen ŝiaj pupoj, jen ŝia knabineta ĉambro." Precize, ŝi ne plu estis knabineto.

Geedziĝo

En tiu longa adoleska atendperiodo, la amatendo estas la plej severa elprovo. Dum nenia alia epoko de la vivo, ĉefe ĉe la knaboj, la deziroj estas tiom postulemaj, kaj, neniam ili estas tiel malfacile kontentigeblaj.

Nuntempe, la situacio pligraviĝas pro la pli kaj pli granda interspaco inter la biologia matureco kaj la socia matureco. La intervalo inter la pubharea eloviĝo kaj la edz(in)iĝo, tre mallonga ĉe la primitivaj popoloj, konsiderinde plilongiĝis en nia civilizo, ĉar la gejunuloj ne kapablas tuj vivteni familion. Sekve, oni devas starigi iun kompromison inter la korpaj sopiroj kaj la sociaj kaj ekonomiaj imperativoj. Malfacile troveblas ekvilibro en mondo, kie la romano, gazetaro, filmo, reklamafiŝo konstante ekzaltas amon, kaj en kiu, kontraŭ la diroj pri mora evoluo, plejparte la malnovaj tabuoj restas.

Ĉar pli kaj pli kreskanta nombro da junaj paroj loĝas en studentaj domoj, la ĝenerala impresio estas ke oni geedziĝas pli juna ol antaŭe. Tute ne! Ek de la jaroj 1931—1932, la meza edziĝaĝo ne ŝanĝiĝis en Francujo: 23 por la viroj; 20, 21 por la virinoj. Eĉ se oni volus, oni malfacile povus pli frue edziĝi.

En Francujo, 50% da junaj paroj loĝas kune kun la gepatroj, 30% vivas en nur unu ĉambro, 15% luis meblitan

"Fascinense"

kvalitaj trikaĵoj
el Anglujo

specialistoj pri ĉiuj specoj de trikitaj varoj —
viraj, virinaj kaj infanaj. Agentoj tra la tuta
lando kaj en eksterlando.

KNITTING MILLS LTD. - HIGHERTOWN - TRURO - CORNWALL - ANGLUJO

5.000.000

loĝejon; nur 5 % estas normale instalitaj...

"Novriĉuloj"

La junularo estas forlasita. Ĝi pensas ke oni ne donas al ĝi ĝian ĝustan lokon. Ĝi ne sentas sin hejme en nia socio. La usona psikologo Lewin komparas ĝian staton kun la kondiĉo de la etnikaj minoritatoj. Same kiel la minoritatoj frotiĝas inter sia propra grupo kaj la majoritata grupo, la adoleskantoj hezitas inter la infana mondo kaj la plenaĝa mondo. Fakte, ili apartenas al nek unu nek la alia.

Flanke de la plenkreskuloj, klarigas Lewin, ilia situacio estas simila al tiu de la novriĉuloj, kiuj ne scias ankoraŭ ĉu ili vere estas akceptitaj de la socia tavolo al kiu ili aliĝas.

Ni efektive konstatis ke ni postulas de la junuloj ke ili estu "moderaj", ke ili "laboru", fine ke ili konduku kiel ni mem, sed samtempe, ni rifuzas al ili la veran aŭtonomion. Ni izoligas ilin en iu "margena situacio", laŭ Lewin. Ili ne konsistigas apartan klason. Ili "rajdas" du klasojn, alproksimiĝante jen al unu, jen al la alia. Neniu gazeto, ekzemple, estas dediĉita al ili. Ili legas aŭ tiun de la fratetoj, aŭ tiun de la gepatroj.

Lewin daŭrigas sian kampanon. Kiel ĉiuj minoritatoj, ili neas sian flankan staton, aŭ, kontraŭe, ili kultivas sian malsimilecon kaj afektas originalecon por finfine sin malliberigi en iu strikte ĉirkaŭbarita societo. Pluraj adoleskantoj simple neas la junularan problemon, kiel kelkaj judoj neas la judan problemon.

"Mi ne diferencigas deksexjaran knabon kaj kvardekjaran viron," diras studento. "La diferencon vi kreas. Laŭ mi, sole la mensa aĝo valoras. Kaj vi scias, oni povas esti juna aŭ maljuna je ĉiu aĝo."

La alia sinteno, pli ofta, konsistas el sinrimarkigo. Tiel agas la nigrabluzuloj. Ili kontraŭstaras la moralon de la plimulta grupo kaj elektas kiel imitindajn modelojn eĉ la forpelitajn de tiu grupo. Plensignife estas ke, elirante la malliberejon, la gangstero Lucky Luciano estis aplaudita de 300 junaj bubaĉoj, kies heroo li estis. Kiel ĉiuj minoritataj grupoj, la bandoj estas strukture striktaj kaj obeas tre severajn leĝojn. Ili ĉiam havas tri aŭ kvar knabinojn por tridek knaboj, ili

nevarie havas deksexjaran estron, leŭtenanton kaj unu "klaŭnon", preskaŭ ĉiuj membroj havas kromnomojn: "Lipharoj", "Unufoje-fracpanto"...

Ankoraŭ alia ekzemplo de tiuj gejunuloj kiuj vivas "en la propra mondo" estas tiu de la du adoleskantoj en Hamburg kiuj, por atingi James Dean (mortinta usona filmaktoro, heroo de la junularo), saltis de la 14-a etaĝo de apartamentaro, interligite per ŝnuro.

Kiel ĉiuj minoritatoj, adoleskantoj estas tre ofendiĝemaj tuj kiam oni kritikas ilian partikularismon, aŭ nur se oni reliefigas ĝin. Ĉu oni povas alimaniere klarigi tiun ĉi freŝdatan okazintaĵon? — Estis kvaropo malpli ol dudekjara antaŭ montrofenestro, kombante siajn longajn harojn, kiel antaŭ spegulo. Subite, sen pripensi, ili bategis maljunulon, simple ĉar li rimarkis ilian artifikon: "Oni lin frapegis ĉar li ridaĉis..."

Profunda estas la malbono. Kiel kontraŭbatali ĝin? Kiel eltiri la junularon el ĝia soleco? Kiel ĝin integri al nia mondo?

Kelkaj rimedoj estas memkompreneblaj: pli da lernejoj, kaj teknikaj centroj, konstruado de sportaj terenoj. Ĉu tiaj estas nur eksteraj rimedoj? Ne, respondas la psikologoj, ĉar kun novaj lokoj kaj ludkampoj je sia dispono, la junularo sin sentus malpli malakceptita de la socio. Ĝi konscius ke strebo estis farita favore al ĝi.

Junularaj organizoj

La junularaj organizoj.... jes..... Laŭŝajne, ilia influo nur povas esti bonefika. Ili eĉ kelkfoje sukcesis reutiligi nigrabluzulojn...

"La junularaj komunumoj," diris profesoro en la Universitato de Paris, "ne devas konsistigi fermitan mondon, iuspecan fuĝon antaŭ la respondeca vivo."

Tie ĉi, evidente, troviĝas la rifo. Por tion eviti la francaj Junularaj Domoj kiuj jam ekzistas, klopodas proponi aktivecojn, kiuj rekte trafas la junulojn sed samtempe ankaŭ la tutan komunumon.

"Eblas, kaj dezireble estas," ankaŭ diras la sama profesoro, "konfidi al la adoleskantoj taskojn, kiuj asociigas ilin kun la vivo de la nacia komunumo, precipe en la grandskala socia servo, kiu ĉiam bezonas homojn..."

Alimaniere ankaŭ oni devas ataki la problemon: starigi antaŭsalajron por la studentoj, garantii al la metilernantoj la samajn salajrojn kiel la laboristoj ricevas, organizi la sinamuzon de la adoleskantoj. Speciale grava punkto se oni konsideras ke pli ol 50 % el ili neniam vizitis teatron, nek koncerton.

Por resanigi la junularon, grandega informlaboro kaj edukklipoj estas urĝe necesaj. Gepatroj kaj edukistoj devas unue konscii pri la fakto ke adoleskeco estas situacio. Necese ankaŭ estas ke ili ĉesu silenti antaŭ la seksaj problemoj. Kuracisto diras: "La junuloj ne devas troviĝi antaŭ elekto inter ĉasteco kaj perverseco, sed inter normala seksa vivo kaj neŭroza seksa vivo." Tio ne signifas ke oni formetu ĉiujn malpermesojn. La "sublimiĝo de instinktoj", tio signifas ilin kanalizati al entreprenoj kiel arto aŭ scienco, estas nepre necesa en ĉiu socio.


Idealoj

Antaŭ tia nekompreneo, kun tiom da obstakloj sur sia vojo, la junuloj pensas kelkfoje ke la plenaĝuloj, koalicie kontraŭ ili, estas malfavoraj al ili: "— Ĉiuj kontraŭas nin..."

Antaŭ ĉio, oni devas ilin persvadi pri ilia eraro. Oni ne kontraŭas ilin. Ilia dilemo estas tiu de la industria epoko en kiu ĉiu metio, kaj precipe la metio esti homo, bezonas pli da tempo ol iam antaŭe por ellerni. Oni proponas al ili, nek firmajn valorajn sistemojn kiel la primitivaj socioj, nek la devigan strukturon de diktatora sistemo. Ofte, kiam ili revas pri brilaj agoj oni proponas al ili pensiulajn idealojn: etan aŭtomobilon, aŭ televidaparaton. Ili devas laŭiri sian vojon vere solaj, en mondo kies valoroj estas fluaj. Ili troviĝas en tute nova situacio. Plejparte la plenkreskuloj ankoraŭ ne konscius pri tio. Pro tio, nenio aŭ preskaŭ nenio estas farita por doni novan statuton al la junularo kaj taŭge aranĝi ilian kondiĉon. Urĝas tamen.

Roland Harari
Enketo de Jacqueline Giraud

(Noto: Tradukante per "nigrabluzuloj" ni retenis la francan esprimmanieron por certa speco de huliganaj, "blousons noirs".)



SKOPJE: sur la muro de neekzistanta loĝejo restis nur du bildoj — edziĝ-festa foto kaj la foto de tri infanoj. Ĉio alia: homoj kaj objektoj, ĉio troviĝas en la ruinoj de granda loĝejdomo.

katastrofoj de la tuta mondo

Jen pasas for la jaro de la katastrofoj. Ĉiuj elementoj de la naturo, elementoj laŭ sia malnova formulo, koleriĝis kaj montris sin en sia plej ekstrema kaj ruiniga forto. Tertremo en Skopje, Jugoslavio; lavanga inundo en Longarone, Italujo; vulkana erupto sur insulo Bali, Indonezio; fajrego en Matto Grosso, Brazilo kaj ventego en Haiti kaj najbaraj insullandoj...

Dum lastaj monatoj mi kiel ĵurnalisto, raportisto de unu slovenlingva ĵurnalo vojaĝis al Skopje kaj al Longarone. Estu nun mia devo rakonti pri memoroj el tiuj lokoj, priskribi la katastrofojn, iliajn karakterojn kaj postsekvojn. Malfacila tasko, neplenumbla tasko. Impresoj kaj memoroj, tiel kutimaj por ĉiu ordinara vojaĝo, en tiaj okazoj estiĝas dokumentoj. Ĉio — notoj en la kajero, fotoj en la fotoaparato, ĉio estas nur dokumento.

Dokumentoj tuŝanta la koron.

Kio okazis en Skopje jam scias la tuta mondo. Eĉ el hispana karcereto, tra reto de la plej severa cenzuro elŝteligis koverto en kiu oni sendas leteron al suferantaj urbanoj de Skopje. La tuta mondo konas la aferon, la tuta mondo helpis al viktimoj por pli rapide rekonstrui la urbon.

Malfeliĉa destino de makedona metropolo en sudo de Jugoslavio estas, ke la epicentro de la katastrofo troviĝis ĝuste sub la urbo mem, sub ĝiaj domaroj, parkoj kaj stratoj. Subita terpuŝo, ekstremo kaj subtera hurlo en momento ŝanĝis la panoramon de la urbo. El polvo, kiu kovris la ruiniĝantan urbon, montriĝis post minutoj alterigitaj etaĝoj kaj kurbaj muroj, laŭ stratoj kuris homoj kun pugno de timo en la gorĝo. La urbo estis detruita. Starantaj domoj estis iluzio: restis ie

muroj sed krakis la fundamentoj, disiĝis la ŝtuparoj. Centoj da homoj restis sub la ruinoj, kaj dekoj inter ili ankoraŭ vivantaj. La helpe venis rapide, sed ĉiam malfrue. Nur malmultaj estis savitaj el sub la gigantaj betonaj blokoj, malmultaj vivantaj. Makedona ĉefurbo, malnova laŭ sia historio kaj nova laŭ aspekto de siaj domegoj en la centro kaj en loĝkvartaloj, perdis en la tertremo sian ritmon de la plej rapide evoluanta jugoslavia urbo. Estis detruitaj domoj kaj ŝtataj oficejoj, malsanulejoj, muzeoj kaj bibliotekoj, fabrikoj kaj restoracioj. Entute ĉio! Urbo ne ekzistis, homoj, kiuj restis vivantaj formis tendurbetojn en parkoj kaj komencis postpremo de timo labori kune kun alvenintoj por konstrui novajn domojn, por ripari ankoraŭ starantajn.

Nun en tiuj tagoj, Skopje estas granda laborejo. Ne nur la urbanoj mem kaj ne nur grupoj el la tuta lando, sed homoj el la tuta mondo konstruas domojn por ke homoj loĝantaj ankoraŭ en tendoj povos savi sin antaŭ vintra malvarmo, kiu ĵus frapas la pordojn de la lando sub Sara-montaro.

☆

Kaj Longarone! Malfeliĉa valo de la rivero Vaiont. Dum la tertremo en Skopje estis nur la naturo kiu kaŭzis la katastrofon, sed en Longarone la homo estis kunaganto, kunkulpanto. Vere, la homa forto ne povis bari la lavangon kiu falante en la lagon levis la mortigan ondon, sed la homa cerbo estis kapabla ĝustatempe rimarki la minacojn kaj savi la vivojn de la loĝantoj ĉirkaŭ la digo sub la monto Toc. La ruino de Longarone kaj de ĉirkaŭaj vilaĝoj estas pli terura ol la ruino de Skopje, pli multaj estas ankaŭ viktimoj. En Skopje la katastrofo havas aliajn dimensiojn — detruita estas granda urbo; sed la katastrofo en Italujo estas same doloriga kaj por la itala popolo kaj por la tuta mondo. Ja neniu katastrofo kiu okazas sur la tero estas nur katastrofo de unu nacio, sed katastrofo de la tuta homaro.

Mi ne volas detale priskribadi la terurojn viditajn ĉar en ĵurnaloj ĉie tra la mondo tio estis jam detale priskribita, mi nur volas atentigi pri tre grava detalo! Kiam en ruinoj de skopja hotelo "Makedonija", kie troviĝis multaj eksterlandanoj, estis trovita vivanta belga fraŭlino, ŝi timeme demandis

la savantojn: "Ĉu eble estis ĵetita atombombo?" Ankaŭ kampanoj el la vilaĝo Casso apud Longarone kiuj loĝis en plej supraj domoj kaj restis vivantaj, diris, ke en la unua momento ili opiniis, ke temas pri subita atombomba atako. Kion diri pri tio? Nur jenon: homoj vivas en konstanta timo pro ekzisto de atombomboj

sur la mondo. Homoj kalkulas je ebleco, ke tiuj bomboj povus esti uzotaj. Kaj katastrofoj en tuta sia terureco donas al ni gravan instruon: ne aspektas Skopje kvazaŭ sur ĝin falis atombombo, ankaŭ Longarone ne, ankaŭ marbordoj de karibaj insuloj, de Bali, ne Matto Grosso. Sed provu en la fantazio unuigi efikojn de ĉiuj tiuj

katastrofoj kune sur unu lokon: de tertremo, lavanga inundo, ventego, fajregoj, vulkano. Terura efiko, terura aspekto. Sed tamen ne tiom terura kiom estus la efiko, kiom estus la aspekto de la mondo post uzo de atombomboj.

Drago Kralj

HERALDO

DE ESPERANTO

**La plej ofte aperanta populara Esperanto-gazeto
De 40 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo**

- ☆ 20 numeroj jare
- ☆ Ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la Legantoj

Jarabono: 4 us. dol.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj, U.E.A. aŭ rekte ĉe la Redakcio:
13 rue de la Reinette—Pijpelingsstr., Bruselo 1

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Alta Kanto

Vili iom mensogis pri tio, ke li ĉeestadas vesperajn klasojn, ĉar — nu, oni devas klarigi sin. "Ehe, baldaŭ vi estos profesoro Vili, ĉu ne?" estis demandinta unu el la servistinoj preterhastante kun brakpleno da platoj kaj kelke da forketoj enpoŝe. Ja ŝi ne povus scii, la povra, ke Vili eĉ se li ĉeestadus vesperajn klasojn ĝis mezaĝo neniam fariĝus eĉ docento. Estas aferoj kiu ŝajne postulas mensogadon. Estis veninta iu juna riparisto, por ripari la lavmaŝinon ĉe kiu Vili staris ok horojn tage enmetante kaj elprenante telerojn; tiu junulo interŝanĝis vortokelkon kun Vili kaj tuj demandis: "Kie vi studentas?" Kaj Vili:

"Nu — kiel vi scias tion?"

"Ho, nur ke vi ne parolas kiel telerlavisto — kaj vi estas juna, kaj —"

Eĉ Ingrid, la plej nova servistino malantaŭ la tabulo, demandis tion saman. Sed Vili ne mensogis al Ingrid. Ingrid estis alia. Li rakontis al ŝi dum la matena paŭzo, kiel li laboras en simpla metio por povi pensi pri eksteraj aferoj dum la laborado kaj por konservi la "psikan spacon". Ingrid nur balancis la kapon, kvazaŭ tio estas jam sufiĉa biografio pri Vili, kaj daŭrigis sian propran senprokraste. Ŝi estas mezaĝa edzino, juda, naskiĝinta en antaŭmilita Germanio kaj devis rifuĝi... antaŭe estis kantistino, ŝi diras... foje kantis en Carnegie Hall... lastan semajnon finis kurson ĉe Berlitz pri la rusa lingvo... pasintan jaron iris kun filino al Israelo por studi la hebrean kaj labori somere en *kibutz*... interesiĝas pri Blavatski, pri Marksismo, pri la junaj poetoj... ŝi parolis kun senbrida entuziasmo, kaj neprudente laŭte, tiel ke la aliaj servistinoj ĉe iom foraj tabloj povis ĉion aŭdi. Vili rimarkis ke tiuj ridetas moke inter si. *Ŝi deliras nur pri si mem*, li pensis.

Post kelkaj tagoj montriĝis klare, ke Ingrid vekas malantaŭdorsan klaĉadon ĉe siaj kunlaborantinoj. Estis ekspektable; Vili aŭdis ŝin diri unu matenon senhezite al Marta ke ŝi ĵus komencis kurson pri la klasika gitaro. Kian intereson tio havas por Marta? Marta estas severe praktika, kaj devas esti tiel; ja ŝi havas familion, sentaŭgan edzon, devas labori... Ŝi estis tia, kian oni en sudorienta urboparto aŭdas argumentantan kun la edzo dum vesperoj, furioziĝantan ĝis la voĉo reagas raŭka je tiel nehoma blekado kaj solviĝas finfine en unu longan konstantan fikriegon sen distingeblaj vortoj. Infanoj timas, maturuloj ridetas kompreneble, iuj vane ignorprovas. Vili vidis destinite ke Ingrid, kiu ŝajne ne kapablis juĝi inter diversaj specoj de homo sed verve parolis al ĉiu, kun tiu juvela kombina karaktero el sperto kaj naivo, suferu la plej amaran frukton de alies misvivita vivo. Ŝi estas eksterulo en nekonvenaj cirkonstancoj — ŝi tro elstaras, ŝi fideme invitas malfidon, ŝi estante nefalsa invitas falsigon. Kaj Vili, kiam okazis malpliigo de la senĉesa enŝovado de uzitaj teleroj kaj manĝiloj, iris al la pordo kaj rigardis malantaŭ la tabulon, kie Ingrid preparadis sandviĉojn, kie Marta servadis salatojn, kie la ceteraj plenumadis siajn diversajn taskojn. Kaj li rimarkis sen surprizo, ke Ingrid jam ne entuziasme konversacias kun la aliaj. Ŝi silente, kun tipe virina ĉagrena-digna mieno fordonas sin al sandviĉ-farado: unu, du, tri, tranĉ', unu, du, tri, tranĉ'... dum la aliaj gaje laŭ sia maniero interparoladas pri siaj ĉiutagaĵoj. Frenezulo silentas inter sanuloj.

Ŝi kulpas mem pri tio, pensis Vili, kaj reirante al sia maŝino lasis siajn pensojn migri kiel ĉiam. Se vere la tero estas pli ol 6.000-jaraĝa, kie interrompiĝas la hebrea genealogio? Kaj ĉu ne eble ke tiu egipta Libro de la Mortintoj verkiĝis pli malfrue ol opiniate, simile al... Kaj ĉu tiu profesoro Price blufis, ke li kreskigis stalagmiton futlongan sub sia ĝardeno ponteto en dek jaroj? Ĉu li trompis sin pro kredvolo? Ja se oni sufiĉe volas kredi ion... kaj ĉu kredo entute necesas? Aliflanke se mi havus kredon, eble mi ne plu lavus telerojn. Eble...

"He Vili," kriisla ĉiam nervoza s-ro Longa, la ĉefo, "balailon tuj en la servejo."

"Bone." Vili prenis la balailon kaj polvuojn kaj elkuris. "Ve," li lamentis vidante la scenon, "vi inoj mizerigas al mi la vivon." Tuta tavolkuko kuŝis renversita sur la planko, kaj buletoj da sukerpasto ŝmiris kelkloke la tabulon kaj ŝrankpordojn. Vili evitante inter la rapidantaj piedoj komencis forpreni la ruinaĵon.

"Mi konservos la parton kiu ne tuŝis la plankon; ĝi utilos morgaŭ por farĉo," li blagis por amuzi la virinojn. Ĉiuj ridis krom Ingrid.

"Plibone," diris Marta, "vi donu ĝin al Ingrid por ke ŝi regalu aŭskultantaron ĉe Carnegie Hall."

"Aŭ ĝin sendu al Israelo," aldonis Ruby.

Ingrid diris nenion: unu, du, tri, tranĉ'. *Eble ŝi ne aŭdis, pensis Vili. Sed "Aĥ!" Sango ekaperis ĉe ŝia fingrekstremo. Vili iris al ŝi kaj tiris vindbendon el sia poŝo.*

"Sidu kun mi dum la paŭzo, ĉu bone?" li petis germane.

Kiam li reiris, Ruby preterpasis lin al la kuirejo.

"Mi ne sciis ke vi parolas jide, Vili?"

"Ne, ne, Ruby; tio estas la —", li gluthaltis, "— la germana. Kiu faligis la kukon?"

"Verŝajne ia akcidento okazis al Ingrid," respondis ŝi iom rikane.

Je la paŭzo Ingrid kaj Vili sidis kune. Nun ŝi ne emis paroli, sed Vili volante vidi ŝin gaja spronis ŝin demandante pri la gitaraj lecionoj. Ŝia vizaĝo iom heliĝis.

"Ho jes, mi faras bonan progreson. Mia instruisto diras, ke mi havas naturan talenton pri kordaj instrumentoj. Ekzemple li montris al mi la teknikon de la *rasqueado*, kaj mi faris ĝin perfekte post nur kelkaj provoj. Vi scias, Vili, ke tio estas malfacila — cetere ĝi vere ne apartenas al la klasika tekniko, ĉu ne, sed al danĉritmoj; la majstro menciis ĝin nur pase; ĉu vi scias, Vili, ke estas speciala agordo de la baskordoj uzita en mezepoka Hispanio, per kiu oni..."

"Pardonu, ke mi interrompas vin, Ingrid," li bruligis al ŝi cigaredon, "sed ĉu vi konas la *Alta Kanto*?"

"Kion?"

"Tiun biblian alegorion..."

"Ah, amdramon, vi volas diri. Jes, kompreneble, en Israelo ni uzis ĝin kiel studotekston en la lingvaj klasoj."

"Ehe! Kaj kiel oni interpretis ĝin?"

"Nu, ne temas pri interpreto. La verko estas sendependa. Por kompreni ĝin vi devas dividi ĝin laŭ la ĥoraj partoj kaj la paroloj de la diversaj roluloj, kio ne estas indikata en la ordinara eldono de la Biblio."

"Ha, ĉu pro tio mi ne ĝuste komprenis ĝin?" Nun ankaŭ Vili komencis paroli iom laŭte. La aliaj virinoj rigardis

ne komprenante, sed amuzite. "Ŝajnis al mi ke iu amoras sin mem!"

La du ekridegis, preskaŭ forgesante kie ili estas. Sed kelkmomente Ingrid ne povis ĉesi; ŝiaj okuloj pleniĝis de larmoj kaj ŝi preskaŭ defalis de sia seĝo. Vili plene kaptis ŝian humoron.

"Kio estas al vi?" li enketis malsobre.

"Nenio, pardonu min. Hazarde mi pensis pri io komika — privata ŝerco."

Vili rigardis ŝin atente dum ili paroladis tra la mal-longa paŭzo. Interesa paro de alternativoj, ke nervstreĉo akumuligis ĝis fina krevo aŭ en koleron, aŭ en senzorgan ridon. Li studis ŝian vizaĝon. Ŝi ne estis bela, en la normala senco. Tro larĝa buŝo; lentugoj; ŝia rekta severe nigra hararo estis tranĉita linie trans la alta frunto, ĵus super la brovoj. Forme ŝi estis iom dika kaj iom tro muskola por virino. Vili havis la kutimon, kiun li opiniis aĉa, imagi al si kiel aspektis la mezaĝulinoj kiam ili estis junaj. Ĉe Ingrid li bildigis al si tre dezirindan junulinon. *Fakte, li pensis, ŝi ankoraŭ estas juna; eble jen ŝia konflikto.*

"Se mi vizitos vin semajnfine ĉu vi signos en mia *Alta Kanto* la ĥorajn partojn?" li demandis kiam finiĝis la ripozo.

"Se vi volas. Sed vi povus simple aĉeti tian varianton."

"Sed krome mi volus paroli kun vi pri aliaj aferoj, kaj renkonti viajn edzon kaj filinon."

"Bone. Mia edzo nepre ŝatus vin — mi forgesis diri antaŭe, ke mia edzo estas negro." Ili stariĝis kaj forlasis la tablon. Ingrid ĵetis rapidan rigardon supersultren. "Neniam, neniam, menciu al ili ke mia edzo estas negro, ĉu?" ŝi petis basvoĉe.

Vili palpebrumis. "Se vi restos labore ĉi tie," li promesis petole, "mi kompreneble devos diskuti la rasecon de via edzo kun la dungitaro, kaj informi al la administrado ankaŭ ke via filino estas komunista putino, kaj ke vi gastigas ebriajn Portorikanojn vespermanĝe, kaj ke inter aliaj kontraŭsociaj agoj vi..." Sed ŝi forŝovis lin ludeme kaj turnis sin al la servejo.

Kelkajn minutojn poste Vili aŭdis fajfadon el la servejo. *Virino, kiu fajfas? li pensis mire.*

☆

Sekvan matenon dum Vili okupis sin pretigante la lavmaŝinon liaj pensoj revenis al tio pri *Alta Kanto*. *Kredo. Se oni havas kredon, Alta Kanto estas alegorio. Se oni ne havas kredon, oni komprenas ĝin senpere. Ĝi staras en la mezo de la Biblio, sed Ingrid diras, ke ĝi estas sendependa. "Tagon, Ruby". Vili apenaŭ rimarkis ke Ruby ne respondis. Eble ĉio estas sendependa. Eble do la vivo estas nekredebla. Li enverŝis sapon kaj ŝaltis la varmigilon. Jes! La vivo estas nekredebla. Li decidis proponi tiun ideon al Ingrid.*

sed Ingrid aspektis preskaŭ plorema. Por havi pretekston li prenis ŝargon da teleroj kaj eliris.

Tie sur la servtabulo en la salata sekcio, antaŭ Marta, estis malgranda plastika ludil-gitaro. Li rigardadis. De tempo al tempo Marta plukis ĝiajn plastikajn kordojn, klarigante al iuj scivolemaj klientoj ke "ĝi apartenas al nia muzikema sandviĉistino tie; ŝi iam kantis en Carnegie Hall." Vili staris tie momente senmove. Tiam formetinte la telerojn li reiris en la kuirejon.

Apogante sin dorse sur la maŝino, manenpoŝe, li sentis sin devigata rigardi plafonon. Akrovaporo kirliĝis kiel eta pluvera galaksio en mondotuto enhavanta nur arkan fluoreskan tubon — eternulon elektran. Kiam okazas la maljusto, ke je la mila fojo nescio supertriumfas scion, je la mila fojo vivdevo venkas vivemon, tiam la homo instinkte turnas la okulojn supren, kiel faris liaj diserĉaj prauloj — aŭ liaj piaj gepatroj. Kaj se oni vidas nur elektran lumilon, do oni studas tiun elektran lumilon kvazaŭ ĝi havus anĝelajn flugilojn kaj estus preta manifesti povigan pinthavan glavon. Sed kompreneble ĉiu havas glavon en si mem — *Kontraŭleĝe estus, mortigi Marta... pensis Vili.*

Kun ankoraŭ brakpleno da teleroj Vili kvazaŭ en sonĝo denove staris malantaŭ la servtabulo. Al Ingrid: "Semajnfine, ĉu bone?" Ingrid diris nenion. Al Marta: "Ĉu via instrumento?"

"Prizorgu viajn proprajn aferojn, Vili," ordonis Marta, ne turniĝante. Leĝere, kvazaŭ fari nenion eksterordinaran, Vili malfermis siajn brakojn kaj lasis la ĉirkaŭ kvindek telerojn fali krake al la kahela planko kaj peciĝi. "Pardonu, ĉu mi rajtas..." Li prenis la plastikaĵon de sur la tabulo. Marta komencis ŝviti iomete. Eble ankaŭ Vili estas frenezulo. Ial ŝi nur daŭrigis sian laboron. La aliaj rigardis senapombe; ĉiu klienta kapo ankaŭ estis alturnita. Vili komencis agordi la etan gitaron. Ĝi havis nur kvar kordojn, do li agordis banĝe.

"Jen!" Li plukis sinsekve. "Plibone, ĉu ne?" Kaj li levis la ludilon superkapen, kaj unubate frakasis ĝin sur la rando de la tabulo.

"Vili! Ĉu vi estas freneza?" S-ro Longo alkuris fine, premante siajn ŝvitajn manojn unu en la alian.

"Mian ĉekon, mi petas."

"Sed... sed hodiaŭ vi laboras ĉi tie precize unu jaron; nun vi rajtos ricevi la dusemajnan libertempon kun salajro! Ne estu stulta, Vili!"

"Mian ĉekon."

S-ro Longo levis la ŝultrojn. "Nu, kompreneble mi devos subtrahi la koston de la teleroj kiujn vi..."

"Bone. Subtrahu, subtrahu."



Vestite kaj trairante la frontan pordon Vili turniĝis por mansigni al Ingrid. Tiu ridetis cinike, kaj, levante sian sandviĉ-tranĉilon al sia lentuga frunto, prezentis ne tro spritan militan saluton.

Ĝuste tiumomente aŭdiĝis nekutima sono en la servejo — kvazaŭ oni plukas kordojn. Vili iris scivole al la pordo kaj elmetis la kapon. Unue li ne povis loki la devenon de la strangaĵo. Li vidis Ingrid laborantan, kaj la ceterajn —



Cicely Tyson

Cicely Tyson, juna usonanino kies tempesta kariero mortigus ordinaran homon. Modelo, aktorino, tajpisto, eventuala verkisto, ŝi preterlasas nenion en sia kuro al sukceso.



Cicely Tyson

Cicely Tyson tutsimple konfesas ke ŝi ne kapablas eĉ kvin minutojn resti trankvila... Ĉiu momento en kiun oni ne puŝas centon da sukcesoprovoj estas, laŭ ŝi, perdita. Kial ŝi daŭre kuras ŝi ne scias. Sed tamen ŝi kuras...

En la vivoplena metropolo Novjorko, kie nerapido kvazaŭ kontraŭleĝas, tamen Cicely elstaras. Jen knabino kiu, ĉirkaŭ 25-jara, jam estas sperta aktorino, modelo, fotografisto kaj tajpisto.

Ĉion ĉi ŝi prilaboras, kaj intertempe ŝi ricevas voĉinstruadon kaj dancleciojn. Sed ŝia ambicio estas iĝi verkisto, kaj pro tio ŝi ĉeestas klasojn ĉiusemajne ĉe la Nova Kolegio pri Socia Esploro. Kun rido Cicely konfesas: "Pro tio mi ne intermiksiĝis kun amo. Mi dubas ĉu ekzistas viro kiu povus toleri mian frenezan tagordon."

Sed tiu "freneza tagordo" ŝajne taŭgas por ŝi: Cicely restas svelta, ambicia kaj ŝajne eferveske sana kaj verva.

Cicely naskiĝis tie en la urbo Novjorko, kiel filino de karibeaj enmigrintoj. Post gimnazio ŝi iris al la Universitato de Novjorko, sed ne sciante precize kion ŝi volas fari. Ĉar modelado tiam laŭmodis, kaj ĉar ŝi havis belan talion, ŝi ricevis instruadon pri modelado kaj

Tenera momento en la dramo "Inter hieraŭ kaj hodiaŭ" (Between Yesterday and Today) kun Bernie Hamilton.

Plurfoje ŝi aperis ĉe televido. Ĉi tie ŝi rolas kiel karibea filino de patro Ossie Davis en dramo pri la socia lukto en la ĝangalo de Novjorko.

Sia ĝis nun plej signifa rolo estis tiu de graveda afrikanino en la televida prezentaĵo "Inter hieraŭ kaj hodiaŭ". Jen ŝi pretiĝas.

Eĉ momentoj por fotografado...


verva dinamo

tuj trafis grandan sukceson. Unu tagon, redaktoro proponis ke ŝi pensu pri aktorado, ĉar ŝi ŝajnis enuita pri modelado. Ŝia unua filmo, "Spectrum" (Spektro) neniam atingis la ekranon: meze de filmado la kompanio bankrotis. Sed tia malsukceso ne senkuraĝigis Cicely. Ŝi ekstudis ĉe du el la plej elstaraj aktoraĵlernejoj en Novjorko kaj baldaŭ trovis ke sukceso simple postkuras ŝin. Post la filmo "Carib Gold", en kiu ŝi ludis kun la aktorino Ethel Waters, venis grandega sukceso en la teatraĵo "Dark of the Moon" (Mallumo de la Luno) — kaj tuta amaso da filmaj roloj, kun Harry Belafonte, Paul Muni, Tony Curtis kaj Burt Lancaster. Samtempe ŝi daŭre ludis en teatraĵoj ĉe Broadway, centro de la Novjorka teatra kvartalo, kaj en pluraj televidaj programoj kaj teatraĵoj.

Ordinaraj junulinoj kontentiĝus per ĉio ĉi — sed Cicely ne. Estas ankoraŭ tiu verkista ambicio, kaj pro tio ŝi dediĉas multajn horojn al legado kaj verkado. Intertempe, venas voĉ- kaj danclecionoj, vespera ludado en teatraĵo, televidaj roloj, eĉ tempo por mallonga trinkado kun kelkaj geamikoj. Kaj dormo? Nu, oni ne povas ĉion fari, vi komprenu.



...kaj fotografiĝo eblas al la plenokupata Cicely. Ŝia interesiĝo pri fotografado estas flanka rezulto de ŝia kariero kiel modelo. La alia interesiĝo? Filmaktoro Sidney Poitier.



NIA PUBLIKA BILDO

Foje, certa junulino vizitis nian fabrikon (laŭ ni, ju pli multaj, des pli bone).
"Kiel bela aŭteto," ŝi diris. "Ĝi precize similas skarabon."

Nu, ni estas sufiĉe simplaj homoj.
Tiumomente ni troviĝis meze de kalkulado pri la grandeco de bremsareo relative al la alteco de ĉevalpovo.

Ŝiaj vortoj tuj alterigis nin.

Post iom da diskreta enketado ni eltrovis ke multaj homoj havas saman opinion kiel ŝi. Sed ni ankaŭ trovis ke oni neniam diras "skarabo" malice. Ĉiam dirlote.

Do, ni rezignis, kaj akceptis nian novan nomon — tiel ke finfine ni eĉ komencis ŝati ĝin.


Ĝi ŝajnas multon diri pri nia maniero de aŭtokonstruado: laborema, neflankiganta, senpretenda.

Ĉiuokaze, multaj homoj en la mondo diligente strebas favore impresi.

Sed ni simple klopodis fari per Volkswagen praktikan aŭton.

Kaj rezulte ni gajnis nian propran publikan bildon.





Donald Broadribb:


saltas ne nur la kanguruoj

Aŭditorio de la Universitato de Melbourne

Ni migris al Aŭstralio el Usono, antaŭ du jaroj. Sekve, la impresoj de la lando estas ankoraŭ freŝa, kaj ankoraŭ ne malklarigis pro troa familiateco. Mi ne scias kion ni anticipis trovi ĉi tie, eble ni neniam havis tre klaran konjekton pri tio. Sed sur ĉi tiu sudpacifika kontinento ni trovis strangan kaj samtempe allogan mikson de la jam kutima kaj la tre nova. Imagu al vi vastan kontinenton, egalan dimensie al Usono, preskaŭ egalan al Eŭropo. Sur ĝia orienta bordo, kvin urbojn: Brisbane, preskaŭ tropikan; Sydney, gigantan metropolon; Canberra, apenaŭ sufiĉe grandan por sin nomi urbo (60.000 loĝantoj), sed ĉefurbon de la federacio; Melbourne, duan giganton; Hobart, la urbon sur la insulŝtato Tasmanio. En tiuj kvin urboj pli ol duono de la aŭstralianoj loĝas. Sekvu la mallarĝan vojon okcidenten, al Adelaide, sur la suda bordo. Pluiru kelkmil kilometrojn plu, sur nepavimita vojo, por atingi Perth sur la okcidenta bordo. Aŭ iru norden el Adelaide al la norda bordo por trafi la vilaĝon Darwin. Jen Aŭstralio, la lando de sep urboj. Kontinento dezerta, marbordoj kovritaj per montaro, arbaro, en kies senakva interno ankoraŭ plumigras kelkaj izolaj homoj, nudaj kaj sen posedaĵoj, kiuj neniam vidis blankhaŭtan personon. Tia estas nia hejmo. Loĝante en la metropolo Melbourne, kie neniam ĉesas la zumado de aŭtoj, trajnoj, tramoj, kaj aeroplanoj, mi facile imagas min ankoraŭ en Usono. Nur la nomoj de la moneroj min memorigas. Aktiva, ĉiam senripoza universitato de 12.000 studentoj, tia estas mia laborhejmo. Ni manĝas kaj dormas, aŭskultas la radion aŭ rigardas la televidon, legas niajn jurnalajn artikolojn, kaj ektimas pro mondpolitiko, sed nur duonhora veturo portas nin al la abrupta rando de tiu ekzisto.

La klimato estas nefidebla. Ĉiu jaro portas novajn surprizojn, kiuj ofte estis katastrofaj dum la pasinteco. Oni esploris, trovis vastajn lagojn kaj verdplenan kamparon, kaj komencis paŝtadi. Sed jaron post jaro la lagoj sekigis, la herbaro malaperis, la brutaro mortis, ne malofte oni mortis akompane. Kaj postan jaron, ekfalis la ĉielaj torentoj. Sen permanenta lago, sen ĉiamfluantaj riveroj, la kontinento

estas loĝebla nur ĉe la randoj; interne, nur vastaj akvum-registemoj ebligas vivon. Do sekvas paradokso, kontinento vasta kiel Usono, loĝantaro malgranda kiel Svedlando.



Universitato de Melbourne: gimnastikejo

Tiu loĝantaro estas same surpriza kiel la klimato. Konstanta alfluo de migrintoj vigligas la vivon. Cies patro aŭ prapatro estis migrinto, se oni mem ne estis. La kaŭzo de la migrado (neeblo integriĝi en la hejmlanda socio) por la originalaj migrintoj, kaj ankoraŭ por la plej multaj, kreis landon kun eminenta demokrata sento. Neniu volas kredi alian "pli bona." Do ĝi estas lando sen donado de trinkmono. Sporto obsedas la mensojn kaj korojn. Konkuras publikaj kaj privataj entreprenoj (banko, radio, televido, lernejoj, aerservo, k.a.).

Kiel oni vivas? Agrokulturo estas ankoraŭ la kerno de la ekonomio, sed industrio estas ĉiam grandskala. "Aĉetu aŭstraliaĵojn" diras la slogano ofte videbla en butikoj, kaj vere, oni povas grandparte plenigi sian vivon per aŭstraliaĵoj. Sed la televidaparato, la horloĝo, la katuna ĉemizo, la magnetofonbendo plu devas veni el Japanlando, aŭ Eŭropo; kaj la libroj preskaŭ ĉiam el Britlando aŭ Usono. Tio evidente altigas la prezojn. Sed neniu povas malsati en ĉi tiu lando kie fluas, se ne lakto kaj mielo, do ŝafid-kotletoj kaj oranĝoj. Per sia salajro la laboranto trovas sian vivnivelon tiel alta kiel ie en Usono. Foje pli alta, ĉar ĉi tie 70 % de la loĝantaro loĝas en propre posedataj domoj.

For, for de la mondo. Tiel ŝajnas, negrave ĉu oni rigardas al la oceano, trans kiu kuŝas nur la sudmaraj insuloj kaj ankoraŭ akvo; negrave ĉu oni rigardas enlanden, al la dezerta kaj defia pejzaĝo senhoma. Des pli oni sentas la izolecon, rigardante supren al ĉielo kies konstelacioj estas novaj, almenaŭ por ni venintaj el la norda hemisfero. Mankas la fidela signo de la nordo, kaj la suda kruco, elstara kaj inspira, nur malcerte indikas la ĝeneralan direkton de la sudo. La sezonoj ŝanĝiĝas: venas Kristnasko, kun somera ferio kaj tropika temperaturo; venas Pasko, kun aŭtuna freŝo; venas la vintro — sen neĝo, sen glacio. Kiu aŭto estas plej taŭga? Oni fabrikas ĉi tie Volkswagenojn ("aŭstraliorigina enhavo: 80 %") kaj reklamas, ke sur la glacikampoj de la suda poluso kaj sur la dezertaj kampoj de la kontinento interno, egalfacile oni veturas kiel sur strato. Oni fabrikas Ford-Falconojn kaj Holdenojn ("la propra aŭstralia aŭto" — de General Motors, aŭstralia sekcio); eksbritoj kuraĝe klopodas grimpi la montetojn per siaj mini-aŭtoj. Sed ankoraŭ neniu plene solvis la problemon.

Estas inspire loĝi ĉi tie. Inspire, ĉar oni ekkonscias, ke disputado pri tereno kaj politiko, triviala fiero pri honoro kaj digno, estas tiel absurde sensignifaj. Kaj ĉar ĉiu tago alportas novan nombron da freŝaj spiritoj; kaj ĉiu semajnfino alportas per veture kontraston inter civilizacio kaj dezerto, homo kaj naturo.



Dormanta kangurua kun sia bebo (ankaŭ dormanta) en la poŝo

Melvin J. Lasky:

Pri la arto kaj scienco de neŭtraleco

"Kiam mi uzas vorton," diris Humpti-Dumpti per iom supereca tono, ĝi signifas precize tion kion mi intencas — nek pli, nek malpli."

"Sed la ĉefa demando," Alica respondis, "estas: ĉu oni kapablas igi vorton signifi tiom da aferoj?"

"La ĉefa demando," diris Humpti-Dumpti, "estas: kiu entute estros? Simple tio."

Ĉi tiujn vortojn verkis Lewis Carroll, angla aŭtoro de "Alica en Mirlando" en sia verko "Tra la Spegulo". Neniu citaĵo povus pli bone taŭgi por nia propra "Mirlanda" mondo de multaj lingvoj kaj sloganoj. De ĉiuj kontinentoj venadis krioj pri "paco" kaj "libereco", kaj ne ekzistas du difinoj precize samaj. Antaŭnelonge en Beograd okazis nova akordiĝo de nacioj dediĉitaj al la principoj de "neŭtraleco" — sed por kelkaj tiu koncepto signifis neŭtralismon, por aliaj simple "pozitivan neŭtralismon" kaj por ankoraŭ aliaj nur "neenviciĝon". La demando pri ŝlosila signifo restas sen respondo. Ĉiu ŝtatestro (kaj la skribanto de liaj paroladoj), praktikante sian intelektan suverenecon, elektas sian propran vortvaloron — laŭ iuspeca memelekto de nocioj. Malofte ĉio ĉi iras pli profunden ol la nivelo de vorta ĵonglado. Sed ŝajnas al mi ke la ĉefa demando estas, ne "kiu entute estros?", sed kiu ĉi estas, vere, la estrantaj realaĵoj.

Konsideru, ekzemple, la rilaton de Usono al la koncepto de neŭtraleco. Dum la plej lastaj jardekoj la usona vidpunkto pri neŭtraleco vagis inter kritikemo kaj rekta malamikeco. Sed dum multe pli ol unu jarcento estis precize tiu juna nacio de amerikanoj kiuj inventis la ideon de "enretigaj aliancoj" kiel minaco al paco kaj sendependeco. Kiel mallongaj estas niaj memoroj!

Sed konsideru la rilaton de alia ŝtato al la koncepto de neŭtraleco — tiun de Svislando. Por multaj homoj, la svisoj kaj la "arto de neŭtraleco" preskaŭ sinonimas. Tiu ĉi inteligenta, prospera, pacama popolo en la koro de Eŭropo evitis implikon en ambaŭ tragediaj mondmilitoj. Sed estas strange kiel malmultan atenton oni dediĉas al la lecionoj de la spertoj de Svislando — kaj ĝis nur antaŭ mallonga tempo ni fakte sciis preskaŭ nenion pri lastatempaj tieaj okazaĵoj. La apero de la studo de Jon Kimche* pri svisa neŭtraleco donas al ni por la unua fojo la dramon de Svislando kaptita inter paco kaj milito, kaj ankaŭ kelkajn gravajn vojindikojn por nia propra epoko kaj ĝiaj problemoj. Dum ses jaroj, eta Svislando, ĉirkaŭfermite de la Alpoj inter Germanio, Italio kaj Francujo, balanciĝis ĉe la rando de katastrofo kaj detruigo. En 1939, post la unuaj militaj triumfoj de la armeo de Hitler, ĝi kuŝis preta kaj matura por rikolto. En 1940, post la konkero de Francujo, la ĉirkaŭado fa-

re de la diktatoroj estis tute kompleta. Eĉ en 1943, kiam la fluo de la milito turniĝis kontraŭ la Berlina-Roma akso, la svisoj restis en grava danĝero — ĉu la Nazioj envenos Svislandon por konservi sian disigantan italan fronton? Fine, en 1945, kiam la milito estis preskaŭ ĉesigita, ili timegis pri la ebleco ke Hitler uzos la Bavarajn kaj Svisajn Alpoj kiel lastrimedan senesperan fortreson. Ĉi tiuj estis danĝeraj kaj senamikaj jaroj. Kiel la svisoj sukcesis travivi ilin? La vorto estis "neŭtraleco" — sed kiaj estis la realaĵoj?

La heroo de la rakonto, laŭ la libro de s-ro Kimche, estas nekonata svisa generalo nomita Henri Guisan. Estis li kiu organizis la defendadojn de la lando: ses dummilitajn jarojn li daŭrigis sian laboron sagace kaj kompetente, spite la tempaltempajn eksplozojn de timo inter la politikuloj kaj paniko inter la popolo. Li trejnigis siajn soldatojn kaj konservis ilian spiriton (kiu estis deprimita kaj preskaŭ ruinigita kiam ili rigardis vicojn da civiluloj kiuj forlasas la landlimajn regionojn). Li lokigis siajn malkonstruajn grupojn en la fabrikojn de Svislando, kaj konstante pretis liaj planoj por la eksplodigo de la grandaj tuneloj Gotthard kaj Simplon kaj de ĉiuj alpaj pasejoj.

Estas ja vere ke ni povas neniam vere scii kiom da senpasia kalkulado estis en ĉi tiu strategio de deteno, aŭ kiom da blufado. Kiom de la memfida firmeco de Svislando estis simple kuraĝa eksterajo? Sed tiu kuraĝa riskemo funkciis. Laŭ Kimche, "Guisan semis la bezonatan dubon en la menso de Hitler. Tio sufiĉis por paŭzigi kaj heziti lin..." Jen, bedaŭrinde, la ĉiama esenco de potencpolitiko — milito, ĉirkaŭado, agresado, deteno, blufado, postvivo. Ĉi tiuj vortoj kaj konceptoj ne multe ŝanĝiĝas, nek ŝanĝiĝas la konfuzaj kaj drastaj emocioj kiuj akompanas ilin.

Sed Guisan sole ja ne estis "la voĉo de Svislando". Fakte estis longaj periodoj de unu aŭ du jaroj kiam lia registaro tute ne konsultis lin. La generalo iris unu vojon, la Prezidento alian — la soldato rezistis, la politikulo serĉis kompromisojn. La duelo inter ili en tiu eta svisa areno estas fascina kaj instrua:

"Tamen, por esti justa al la Federacia Prezidento, Pilet Golaz, oni devas diri ke ankaŭ li sekvis la samajn ĉefajn celojn kiel Guisan. Li volis ŝirmi la svisan sendependon same

multe kiel Guisan, sed Pilet Golaz povis vidi esperon por tio nur en serĉado de plej kompleta svisa akomodiĝo al germanaj bezonoj kaj postuloj; kaj Guisan povis vidi esperon (kaj nacian memestimon) nur en politiko de senlaca rezisto al la germanoj. Guisan do konsideris ĉiun paŝon de Pilet Golaz al kontentigo de la germanoj kiel unu plian paŝon laŭ la vojo de neevitebla kaj totala subigo; Pilet Golaz, siaflanke, interpretis ĉiun geston de obstino flanke de Guisan, kiel unu plian movon al la fatala provokado de Hitler kiu rezultigus la invadon de Svislando..."

Estas dubinde ĉu ekzistas iu tribo, popola aŭ nacia historio ie en la mondo kiu ne rakontas tiun saman dramon de klasika lukto inter du bazaj politikaj temperamentoj. La obstinuloj firmas — kaj la kontentiguloj kontentigas. Ĉiam estas "rezistantoj" kaj "adaptantoj" — tiuj kiuj kredas je la principo de forto (kaj la forto de principo), kaj tiuj kiuj pensas ke la akra kaj kruela logiko de cirkonstancoj neprigas cedojn kaj kompromisadon. Singardo ĉe unu homo estas perfido ĉe alia.

Kaj precize tiel ŝajnis al Guisan kiam, ekzemple, svisaj diplomatoj en Berlino daŭre insistis pri eliminado de ĉiuj raportoj kaj komentoj en svisaj ĵurnaloj kiuj eble ofendus la Naziajn instancojn. Por li "neŭtraleco estis principo de eksterlanda politiko, ne de etiko. Ĝi konsistigas programon de eksterlandaj rilatoj, ne moralan ideon." La tuta problemo ĉiam turmentadis la "neŭtralulojn" de svisaj publikaj aferoj. "Ĉu neŭtraleco ne gvidas nin al nuligo de moralaj sentoj? Ĉu ĝi ne kondukas, kiam oni diligente subtenas ĝin, al la abomena kondiĉo de rezigna kaj senkuraĝa indiferento?" La respondo, laŭ ilia interpreto, estis ke neŭtraleco estas sole afero por la ŝtato — ne por la privata individuo. Ne povus esti neŭtraleco de konscienco, pensado aŭ sin esprimo. Jen denove vortoj, eble noblaj vortoj, sed vortoj malfacile pravigeblaj dum danĝeraj epokoj. Prezidento Golaz konsideris necese kaj laŭcele liberigi retenitajn germanajn aerarmeanojn, denove permesi al Naziaj ĵurnaloj enveni la landon, pridiskuti kun la Nazia ministro Funk manierojn de ekonomia kunlaboro, prokrasti proceson kontraŭ retenitaj germanaj aerarmeanoj, Hitleraj sabotistoj kiujn oni kaptis meze de iliaj klopodoj eksplodigi mili-

tajn flughavenojn, kaj eĉ klopodi amiki al lokaj Naziaj agitantoj. Ĉu ĉio ĉi povus vere helpi al pligrandigo de la eblecoj de postvivo? Se la potenca kaj agresema malamiko eble detenus sin pro kaŝa respekto al kuraĝo kaj obstino, ĉu facilanima oportunismo ne rezultigus nur malestimon?

La rakonto havas feliĉan finon, kaj ĝiaj kaŭzoj kaj sekvoj estas — almenaŭ por la historiisto de svisa neŭtraleco — klaraj. Kiel skribas Kimche:

"... Ĉar Guisan pli ol iu alia homo komprenis je la fino de ĉi tiu murdoplena milito kial Svislando restis netuŝita, sendependa kaj, formale parolante, neŭtrala. Ĝi ne estis produkto de la garantio donita al la lando de la Grandaj Potencoj. Ĝi ne ŝuldiĝis al la akcepto flanke de la militantaj potencoj de la koncepto de neŭtraleco, nek al la fakto ke la svisoj flirtigis la flagon de neŭtraleco je ĉiuj eblaj okazoj — kelkaj fakte senesperaj. Ili restis liberaj kaj en paco ĉar ili preparis militi, ĉar ili pretis batali, kaj ĉar, precipe, ili montris preterdube ke la svisojn oni venkus nur je alta kosto. Kaj la kosto kiun Guisan postulis kontraŭ svisa sendependo estis pli alta ol eĉ Hitler pretis pagi."

La aprezo de Kimche pri la konsekvenco de ĉio ĉi ĉe aktuala pensado pri neŭtraleco kaŭzas kelkajn tre akrajn komentojn rilate la Babelon de sloganoj aŭdeblan ĉe UNO (de kiu organizo, parenteze, Svislando ne estas membro). Ŝajne estas profunda diferenco inter la farado de "deklaroj pri neŭtraleco" (kaj Kimche inkluzivas "neenvicigon", "neŭtralismon", "pozitivan neŭtralismon" kaj "neapogon" sub tiu sama titolo) kaj la posedo de vere neŭtrala politiko. Deklarante sian opinion retorike pri ĉiuj ĉefaj mondproblemoj, kaj ĉiuj dornoplenaj diferencoj inter la grandaj potencoblokoj, la novaj neŭtralistoj fariĝis "krucmilitistoj por justaj partioj". Kimche konkludas jene:

"... Estus bone denove resumi la etan lecionon kiun ni lernis de la svisa generalo Guisan. Neŭtrala aktivismo kaj interveno estis permesebla kaj necesa en la kazo de Svislando ĉar ĝi esencis por la defendo kaj sendependo de la lando. Ĝi ne estis slogano por krucmilitado... Kaj tuj kiam tio okazas, neŭtraleco, neŭtralismo kaj neenvicigo fariĝas blufado aŭ politika mito."

Ĉi tio kompreneble ne finas la debaton

inter la neŭtralaj nacioj dum ili klopodas difini kaj redifini la vorton "neŭtraleco" en sia strebado al paco, libero kaj sendependo. Sed eble Lewis Carroll plej bone diru la finan averton:

"Tio estas multo kiel signifo por unu

vorto," diris Alica per pensema tono. "Kiam mi igas vorton multon labori tiumaniere," diris Humpti-Dumpti, "mi ĉiam donas al ĝi krompagon."

* Jon Kimche: *Spying for Peace* — General Guisan and Swiss Neutrality. London, Weidenfeld and Nicolson, 1961.

Kelkaj vortoj de la redaktoro

Ĉi tiu estas la unua regula numero de nia nova gazeto "Kontakto". Kompare kun la fulmrapida produktado de la provnumero, ni havis tempon ĉe ĉi tiu numero iom pli zorge kaj detale ellabori la materialon kaj la ĝeneralan prezenton. Ni esperas ke la rezulto plaĉas al vi.

Vi certe rimarkis ke ne nur la ĝenerala aspekto de la gazeto ŝanĝiĝis, sed ke ankaŭ pligrandiĝis la formato. Decidante pligrandigi la gazeton ni tamen faris grandan riskon: ni ankoraŭ batalas por gajni abonantojn (kaj JMA kaj MA-K de UEA) kaj la kvar ekstraj paĝoj simple devigis al ni varbi pli da abonantoj kaj membroj por eviti financon perdon.

Kompreneble, ni volas servi al viaj bezonoj kaj deziroj, sed tion ni nur povas fari, unue se ni posedas la financajn rimedojn, due se vi pretas daŭre informi nin pri precize tiuj bezonoj kaj deziroj. La plibonigoj en la nuna numero estas rekta rezulto de la malavara financa subteno kiun ni ricevis ĝis nun, kaj de la kritikoj kiujn oni jam direktis al "Kontakto", ĉu private ĉu per recenzoj. Ni alte taksas viajn opiniojn: pro ili ni ekzistas.

Sed ni volas ankoraŭ plibonigi, kaj tio postulas pli da mono. Tri aferojn vi povas fari por ni: varbi abonojn, kontribui aŭ kolekti kontribuojn al la Fondajo Junulara Gazeto (vidu la duan kovrilpaĝon), varbi reklamojn. Rilate la unuan, ne forgesu ke vi ankaŭ povas abonigi personojn el nepagipovaj landoj; rilate la trian, ni nuntempe kampanjas ĉe neesperantistaj entreprenoj kaj bezonas ankaŭ vian helpon tiurilate. Se vi pretas, ekzemple, viziti kelkajn entreprenojn en via hejmurbo por varbi reklamojn, kontaktigu tuj, pere de la redakcio, kun nia reklama redaktoro, kiu pretas konsili al vi kaj liveri al vi flugfoliojn.

Kaj bona gazeto antaŭsupozas bonan materialon. Vi ĉiuj povas ion fari tiurilate. Se vi trovas bonan artikolon en nacilingva gazeto, sendu ĝin al mi kune kun esperantlingva resumo. Ni mem prizorgos eventualan tradukon kaj representmeson. Se vi povas mem verki, aŭ sendi al ni fotojn, des pli bone. Kaj ankaŭ, kompreneble, ni bezonas viajn leterojn al la redakcio — kaj viajn kritikojn.

Jam ni faras niajn planojn por la somera numero. Ni antaŭvidas ke ĝi inkluzivos artikolon pri Nederlando kaj precipe Amsterdam, nia venonta kongresurbo; artikolon pri la Novjorka Monda Foiro, kiu malfermiĝos en aprilo; humuran artikolon kaj... verkon vian, ĉu ne?

Memoru: ju pli da mono, des pli da paĝoj kaj des pli bona la gazeto!

Vi bone subtenis nin ĝis nun. Ek al novaj sukcesoj!

Humphrey Tonkin

ESTRARO DE T.E.J.O.

Günther Becker, prezidanto, Schlossbergstr. 51, 6653 Blieskastel, Saar, Germanio.
Carlo Minnaja, ĝenerala sekretario, Viale Giulio Cesare 223, Roma 6, Italio.
Simeon Simeonov, vic-prezidanto, G. Gencv 22, Sofia-C, Bulgario.
Humphrey Tonkin, redaktoro de "Kontakto" kaj kasisto, 7 Linnaean Street, Cambridge 38, Mass., Usono.
Marek Pietrzak, estrarano pri planado kaj eksteraj kontaktoj, Dworcowa 1, Kluczbork, Pollando.
Ivo Osibov, red. de "La Juna Vivo", Splitskog Odreda 15, Split, Jugoslavio.
Svobodan Zlatnar, estrarano pri kulturaj kaj lernejoj aferoj, Rimska 7, Ljubljana, Jugoslavio.

☆

LANDAJ SEKCIOJ DE T.E.J.O.

AŬSTRIO:

BELGUJO:

Van Humbeeck, Ridder Dessainlaan 3, Mechelen

BRITUJO:

13 Oak Lane, Beccles, Suffolk

BULGARUJO:

pk. 587, Sofia

FRANCUJO:

34 rue Vauvenargues, Marseille 7

GERMANIO:

Am Festungsgraben 53, 23 Oldenburg

HISPANUJO:

Salvador Aragay, Arce 8-2-4, Cornella, Barcelona

ITALIO:

Gaspere Bracchi, Via Caimi 54, Sondrio

JAPANIO:

1-13 Motomachi, Bunkyo-ku, Tokio

JUGOSLAVIO:

Terazije 42, Beograd

MADAGASKARO:

176 Route Circulaire, Tananarive

NEDERLANDO:

Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z.

NORDAMERIKO:

30 Avenue B, New York 9, N.Y.

POLLANDO:

Dubois 3, Wroclaw

SVEDUJO:

Lars Olsson, Lilla Fiskaregatan 3, Lund

SVISLANDO:

pk. 33, Lyss/BE

(KOREIO: Taekeng Kim, 104-43 An Am-dong, Seong-Puk, Seoul)

VARBU

UNIVERSITATANOJN

per la speciala informilo de UEA kaj STELO
tekstoj angla, franca, hispana, germana,
rusa kaj japana.

Subskriboj de 50 profesoroj.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA

(po 0,06 gld. — 0,24 st)



T.E.J.O.

HAVAS PLI OL

OK MIL MEMBROJN

Ĉu vi troviĝas inter ili?

Petu detalojn pri membreco ĉe
UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2
Nederlando.



20a Internacia Junulara Kongreso

Amsterdam, Nederlando

8—15 aŭgusto 1964

Adreso: Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z.,
Nederlando

Kongresejo estos la Internacia Junularcentro "Anne Frank Domo", la domo, kie en la dua mondmilito vivis kaŝite Anne Frank, kiu konatigis pro sia Taglibro.

Por detaloj vidu la koncernajn anoncojn en La Juna Vivo (rubriko en Esperanto).

LERNEJAJ ABONOJ DE "KONTAKTO"

"Kontakto" estas kutime abonebla kontraŭ 8 guldenoj jare, sed TEJO pretas disponigi la gazeton al lernejanoj kontraŭ jarkotizo de nur 2,50 guldenoj (10 steloj).

Tion TEJO faras simple por helpi en la livero de taŭga legmaterialo al lernejanoj kiuj lernas Esperanton.

"Kontakto" taŭgas por la pli aĝaj lernantoj (14-jaraj kaj pli) kaj por, ekzemple, anoj de instruistaj seminarioj.

Tiaj abonantoj devas esti lernantoj de Esperanto en oficiala kurso de iu lernejo. Oni devas samtempe pagi minimume 10 abonojn kaj sendi al la administracio de "Kontakto" atestilon sur oficiala skribpapero de la koncerna lernejo, kun informo ke ili estas destinitaj al oficiala Esperanto-klaso en tiu lernejo, kaj kun subskribo de la koncerna respondeca persono. Ni ne povas disponigi ekzemplerojn je ĉi tiu favora prezo al neoficialaj kursoj aŭ al lernejaj klasoj. Ĉiuj ekzempleroj por unu lernejo estos kune ekspeditaj en unu pakajo.

Individuajn numerojn ni povas liveri laŭ samaj kondiĉoj, kontraŭ prezo de 3 steloj (0,75 ned. gld.) por unu ekzemplero. Administracio: "Kontakto", UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando.

Ĉu vi havas

Anglalingvajn Amikojn ?

Ili *flipos*, lernante Esperanton per iu el la *gruvaj* lerniloj haveblaj de Usono

1. Teach Yourself Esperanto Kit (53 steloj).

Kunigas la plej bonajn lernilojn el la tuta mondo.

2. Harvard Esperanto Club Correspondence Course

(80 steloj). Aldonas al n-ro 1 individuan helpon ĉe 15 lecionoj, de studentoj en la Universitato Harvard.

Petu informbroŝuron aŭ mendu nun ĉe:

Esperanto Education Center AB,
P.O. Box 406, Cooper Station,
New York, N.Y. 10003, U.S.A.



- Kiam mi estos plenaĝa, mi fariĝos piloto. Mi ĉirkaŭflugos Afrikon en unu horo..... Mi flugos al Japanujo kaj Ameriko.... kaj iun tagon mi eĉ flugos al la lunoj!

Paciencon, mia knabo, paciencon! Via fantazio kurigas vin tro rapide. Nur longjara, pena laborado povas realigi viajn revojn.

- Sed, mi volas fariĝi elstara piloto. Neniam mi riskos ion ajn kaj post ĉiu flugo mi alterigos sekure miajn pasaĝerojn kaj kunnavigistojn.

Bonege, junulo. Kaj kiam via revo efektiviĝos, tiam memoru, ke, alte en la aero kiel ankaŭ surtere, Philips plifaciligas vian taskon dank' al la plej fidindaj elektronikaj ekipaĵoj: radio-sendiloj kaj riceviloj, telegrafoj, signal-stacioj, ĉiuspecaj instrumentoj por esplorado kaj elprovado, instalaĵoj de radaro kaj lumigado.

Tiam, samkiel nuntempe, Philips helpos por fari nian mondon pli loĝinda. Tiam, samkiel nuntempe, Philips konservos la spiriton, kiu faris ĝiajn produktojn mondfamaj por sekureco kaj fidindeco, jam pli ol sepdek jarojn.

Hodiaŭ - kaj estontece - rigardu al

PHILIPS

